

○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○

Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 148, Decembro 2016**

○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○—●—○



Go-kunsido dum la 103a Japana Kongreso

En la unua vico, de maldekstre: Nišimura Joŝihiro, Sakurai Nobuo, Jamagiŝi Ecuko,
en la dua vico: Hori Jasuo, Iŝida Tomoko, Mori Hitoŝi, Mijauĉi Nobujuki, Iŭata Joŝikane,
Ŝimadu Mijako, Futacugi Tooru, BUI Thi Phuong (Vjetnamio) kaj Kon Kumiko



Ekde la 8a ĝis la 10a de oktobro okazis la 103a Japana Esperanto-Kongreso en la urbo Oumi-Haĉiman en la gubernio Ŝiga. La 8an okazis kunsido de Go kaj partoprenis en ĝi 12 homoj.

Duono de la partoprenantoj tute ne sciis, kiel ludi go-on, do s-roj Sakurai, Mori kaj Hori montris la manieron al ili.

Komence de la kunsido ni havis malgrandan kunsidon pri la agadoj en 2016 kaj pri la agadplano en 2017. Tiuj estas montritaj sube.

Agadplano de JEGA por 2016 kaj la raporto

1. Estraro

Reprezentanto: HORI Jasuo (s-ro)

Sekretario: MORI Hitoŝi (s-ro)

Kasisto; SAKURAI Nobuo (s-ro, Honora Reprezentanto)

2. Laborplano

(1) Kunsidoj

Novjara kunsido : 2016.1.10 en la Go-salono de s-ro Sakurai

* Ni havis, sed nur 4 esperantistoj partoprenis.

Maja kunsido : 2015.5.14-15 en Esperanto-Domo de Jacugatake

* Ni ne povis okazigi ĝin pro manko de partoprenantoj.

La 101a UK en Nitra : en Movada Foiro kaj en salono ni gvidos ĝo-kurson.

* Ni montris nian agadon dum Movada Foiro, sed en la komuna salono ni ne povis pro maloportuna tablo-konsisto.

La 103a Japana Esperanto-Kongreso.

* Ni havis kunsidon. Partoprenantoj estis 12.

La 64a Kansaja Kongreso en julio 2016

*Okazis Go-kunsido kaj partoprenis 6 homoj.

(2) Eldono de Go-amiko

En aprilo, aŭgusto kaj decembro ni eldonas nian revuon.

* Ni eldonis laŭ la plano.

Go-amiko aperos en nia retejo:

<http://jega.shisyou.com/jega/index.html>

(3) Kotizo de JEGA

Japanaj membroj pagu 1000 enojn kiel la jaran kotizon. Se eblas, donacu 1500 enojn pli.

Eksterlandaj abonantoj ricevos la revuon senpage.

*Se ili volas subteni la agadon de EGLI, ili membriĝu al EGLI, pagante la jaran kotizon de 10 eŭroj al UEA-konto de EGLI.

(4) Libro kaj go-tabuloj

Ni havas relativegrandan stokon de go-libroj kaj tabuloj.

* "Invito al GO-Ludo" (maldika libro): ni senpage donacos.

* "Fundamento de Taktiko kaj Strategio de GO-Ludo" (dika libro) kun pago.

* Go-tabulo (9x9-linia) kaj ŝtonaroj: ni senpage donacos dum UK-oj.

(5) Forpaso de membroj:

S-ro Takehana To: la 28an de oktobro 2015 en la aĝo de 94 jaroj

S-ro Nakai Cuneo: la 10an de aprilo 2016 en la aĝo de 87 jaroj

Agadplano de JEGA por 2017

1. Estraro

Reprezentanto: HORI Jasuo (s-ro)

Sekretario: MORI Hitoŝi (s-ro)

Kasisto; SAKURAI Nobuo (s-ro, Honora Reprezentanto)

2. Laborplano

(1) Kunsidoj

Novjara kunsido : 2017.1.9 en la Go-salono de s-ro Sakurai

Maja kunsido : 2017.5.20-21 en Esperanto-Domo de Jacugatake

La 102a UK : en Movada Foiro kaj en salono ni gvidos ĝo-kurson.

La 104a Japana Esperanto-Kongreso: ni havos kunsidon.

(2) Eldono de Go-amiko

En aprilo, aŭgusto kaj decembro ni eldonas nian revuon.

Go-amiko aperos en nia retejo:

<http://jega.shisyou.com/jega/index.html>

(3) Kotizo de JEGA (same kiel en la antaŭa jaro)

(4) Libro kaj go-tabuloj (same kiel en la antaŭa jaro)



Movada Foiro
en Nitra

Kiel mi komencis ludi GOon

Mi komencis ludi Go-on kaj lertiĝis, sekvante mian plijunan fraton 勝 (Masaru). La signifo de lia nomo estas “venko”. Mia rakonto devas esti el la memoro pri li, kiu mortis en la aĝo de 36 jaroj pro kancero en marto de 1997.

En la jaro 1971, mia familio loĝis en la urbo Asahikaŭa en la centro de Hokkajdoo, la plej norda insulo el la ĉefaj japanaj 4 insuloj. Tiam Masaru estis lernanto en elementa lernejo, kie komenciĝis “deviga klub-agado”. Masaru elektis Go-klubon, sekvante sugeston de nia patro, kiu estis ĉirkaŭ 5-6 *kjuu*-a Go-amanto. En la klubo, instruisto, kiu zorgis klason de Masaru, gvidis la klubanojn. Hejme, nia patro, ludante kun li, instruis Go-on al Masaru.

Mi, tri jarojn pli maljuna ol Masaru, estis lernanto de mezlernejo, kaj kune kun Masaru komencis lerni Go-ludon de nia patro, de lernolibroj, ĉefe publikigitaj sub verkanta nomo de tiama MEJZIN (La Majstro) titolulo, SAKATA Eio. Ni, Masaru kaj mi, rapide fortiĝis kaj plifortiĝis ol la patro.

*Esperantaj tradukaĵoj de du el la lernolibroj troviĝas sub interreta paĝo de Japana Esperantista Go-Asocio, <http://jega.shisyou.com/jega/index.html>.

Eĉ post kiam Masaru finis la kurson kaj klub-agadon en la elementa lernejo, ni daŭrigis Go-ludadon. En la jaro 1974, nia familio transloĝis al la urbo Tojama en la japana ĉefa insulo, Honŝuu. Tie mi kaj sekve Masaru lernis en supera mezlernejo. Masaru partoprenis en la tutlanda Go-konkurso de lernantoj en superaj mezlernejoj. Li venkis la lokan turniron en la gubernio Tojama, kaj veturis al Tokio por la tutlanda konkurso. Tiam la loka filio de Nihon-Ki-In (Japana Go-Instituto) donis al li diplomon por amatora 3a *dan*-ulo. Vidu la foton en la sekva paĝo. Tiam, li estis pli forta ol mi je du anticipe-metitaj ŝtonoj, do mi min rangis kiel 1a *dan*-ulo.



Ni, post la studentigo, malpli ofte sed fojfoje ludis G-on. La diferenco de la forteco inter Masaru kaj mi ne malgrandiĝis.



Al japanaj ordinare donita estas budhisma postmorta nomo. Masaru mem preferis budhisman nomon, “樂棋院 (Rakuki-in)”, kiu signifas Go- amuzulon. 南無阿弥陀仏 (Namu Amida-Butu).

(Preĝfrazo de nia budhisma sekto)

MORI Hitosi mori_kin@nifty.com

AlphaGo kontraŭ majstro Lee: artefarita inteligenteco kaj la homa cerbo kiel bazo de la biologia

Prelego prezentita en Luksemburgo, 3-an de majo 2016

D-ro Christoph Klawe

La prelego resumas la historion de la evoluo de komputilaj programoj, kiuj scipovas ludi ŝakon kaj goon. Ĝi indikas la gravajn diferencojn inter la du ludoj kiel ekspliko de la malsukceso programi fortajn go-programojn en la pasinteco. La prelego prezentas la funkciadon de la nun surprize sukcesa programo "AlphaGo", kio eĉ rezultis en publikigaĵo en januara eldono de la plej grava scienca ĵurnalo „Nature“ kaj detale eksplikas la aspektojn de la funkciado de la homa cerbo, kiuj estis la modelo por la programo. La prelego prezentas la turniron de „AlphaGo“ kontraŭ la plej fortan homan go-ludanton, Lee Sedol, kio okazis de la 9-a ĝis la 15-a de marto 2016, kaj meditas demandojn pri la kulturo de la ludo kaj la evoluon paŝon, kion la rezulto de la turniro signifas.

Japana Honora Meijin Ĉo Ĉifun malvenkis kontraŭ “DeepZen Go”




La 20an de novembro okazis la dua partio inter Ĉoo (60-jara) kaj japana AlphaGo “DeepZen”, kaj Ĉoo malvenkis. Li diris: “Mi tre malbone ludis. Mi kvazaŭ perdis voĉon. En la tria partio mi venkos”. S-ro Kato Hideki el la teamo de “DeepZen Go” diris: “Ni estas ĝojegaj. En la unua partio ni malvenkis, do ni 1,6-oble plilongigis konsidertempon, kaj eble pro tio ni venkis. En la tria partio ni pli evoluigos ĝian kapablon”. DeepZen havas funkcion memlerniĝi. Ĉoo estas unu el la plej elstaraj goistoj en Japanio.

Go-ekzercaro por komencantoj (13)

N.Sakurai

Kio estas la ĝusta meto de Nigro? Ĉu kapti la blankan ŝtonon estas bona? Pensado estas necesa.





Respondo A: (bona)

N-1 estas ĝusta. Tiam la nigraj ŝtonoj ne kaptiĝas, kaj male la blankaj tri ŝtonoj kaptiĝas.


Respondo B: (Malbona)

Se Nigro kaptas la blankan ŝtonon kiel N-1, tiam Blanko minacas per B-2 kaj B-4 kaj la nigraj ŝtonoj kaptiĝas.




La problemo 247-a

Nigro havas meton. La temo estas kiel eviti lavangon.



La problemo 248-a

Nigro havas meton. Mortigu la blankan en bona procedo.



La solvo 247-a

La blanka ŝtonaro mortas.

Fig. 1-a. (La solvo) N-1, tiam Blanko ne povas meti ĉe la punkto N-3 por fari la lavangon pro la sufokiĝo. Se Blanko kaptas kiel B-2, N-3 denove sufokas la blankan ŝtonaron. Tiel la blanka ŝtonaro mortas.

Fig. 2-a. (Malsukceso) Al N-1 Blanko rezistas per alternekapto B-2, kio estas malsukceso de Nigro.




fig. 1-a.




fig. 2-a.

La solvo 248-a

La blanka ŝtonaro mortas.

Fig. 1-a (La solvo) N-1 tranĉo estas ĝusta solvo.

Fig. 2-a (Daŭrigo) N-3 estas grava procedo. Al B-4 sekvas ekde N-5 ĝis N-9 kaj la blanka ŝtonaro perdas alian okulon kaj mortas.




fig. 1-a




fig. 2-a

Fig. 3-a (Vario) Ĉe B-6 de fig. 2-a, se B-1, sekvas N-2, B-3, N-4 tiel Blanko sufokiĝas. kaj la ŝtonaro mortas.

Fig. 4-a (Malsukceso) N-1 sen meto de N-3 de fig. 2-a, tiam B-8 estas deviga kaj ĝis B-10 la blanka ŝtonaro vivas.




fig. 3-a




fig. 4-a

Fig. 5-a (Malsukceso) N-1, N-3 estas inversa procedo. Blanko metas B-4, kaj al N-5 per B-6 la blanka vivas.

Fig. 6-a (Malsukceso) Al elŝpruco N-1 B-2 estas aplomba. La meto garantias unu okulon ĉe la malsupra flanko. Poste ĝis B-6 la blanka ŝtonaro vivas.




fig. 5-a




fig. 6-a

お知らせ

ハケ岳囲碁合宿 2017年5月20日(土) - 21日(日) ハケ岳エスペラント館
Maja kunsido: 2017.5.20-21 en Jacugatake-Esperanto-Domo

第65回関西エスペラント大会での囲碁分科会 2017年6月3-4日
Go-kunsido en la 65a Kansaja Kongreso la 3a kaj la 4a de junio 2017

JEGA 第37回新春囲碁大会のお知らせ

恒例の新春囲碁大会を下のように開きます。奮って参加してください。

日時： 2017年1月9日(成人の日) 10:30~16:00

場所： 大崎囲碁クラブ (電話 03-3491-1349)

(JR大崎駅下車、北改札口を出て西口へ。向かい側藤和大崎コープ4階405号室。)

会費： 2000円(当日お弁当を用意します) *年会費、寄付金も受け付けます。

出欠の連絡： メール、ファックス、電話で、堀までご返事ください。

堀泰雄 371-0825 前橋市大利根町2-13-3

メール：hori-zonto@water.sannet.ne.jp 電話・ファックス：027-253-2524

La 37a Novjara Go-konkurso de JEGA

Ni okazigos la 37an Go-konkurson de JEGA jene :

Dato : la 9an de januaro 2017 ekde la 10 :30 ĝis la 16:00a

Loko : Go-klubo de Oosaki (tel : 03-3491-1349)

en la ĉambro 405 en la 4a etaĝo de la apartamentaro de Toowa-Oosaki tuj antaŭ la okcidenta elirejo de la JR-stacidomo Oosaki en Tokio

Kotizo : 2000 enoj inkluzive de lunĉo

Kiam vi partoprenos, kontaktu Hori Jasuo (hori-zonto@water.sannet.ne.jp)

S-ro Hori eldonis du librojn.



La unua estas “Pacmesaĝoj tra la mondo”. (A4-formato, 192 paĝoj, koloraj fotoj, la japana kaj Esperanto, 15 eŭroj)

La dua estas “Esperanto-esearo de mondvojaĝanto s-ro Hori n-ro 6” (B5-formato, 224 paĝoj, en la japana lingvo, 12 eŭroj)

Kio estas JEGA?


Japana Esperantista Go-Asocio naskiĝis en la jaro 1979 kiel organizo de japanaj esperantistaj go-amantoj kaj subtenanto de Esperantista Go-Ligo Internacia, kiu celas disvastigi go-on per Esperanto kaj Esperanton per go-o.

Ek de la fondo de la asocio nia organo "Go-Amiko" estis eldonita jare kvarfoje, sed ekde 2015 trifoje, kaj ĝi daŭras ĝis nun kalkulante numeron pli ol 148-an.

Unu el la fondinto de la asocio, kaj dum la frua periodo la direktoro, Minosuke EMORI elverkis kaj eldonis gvidlibrojn de Go-o en Esperanto "Invito al Go-Ludo" kaj "Fundamento de Taktiko kaj Strategio en Go-Ludo" por disvastigi go-on tra la tutmonda esperantistaro.

La membronombro de la asocio kalkuliĝas ĉirkaŭ 40 konstante. La agado de la asocio estas okazigo de novjara go-kunveno kaj de go-kunloĝado en Esperanto-Domo de Jacugatake.

JEGA とは 日本エスペランチスト囲碁協会は 1997 年に発足。創立以来 Go-amiko を季刊で発行、現在 148 号になっている。会員は 40 人、新春囲碁大会と八ヶ岳エスペラント館での合宿を定例の行事にしている。出版物には Invito al Go-Ludo (囲碁への招待) と Fundamento de Taktiko kaj Strategio en Go-Ludo (囲碁の戦術・戦略の基本) がある。



Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) 日本エスペランチスト囲碁協会
Esperantista Go-Ligo Internacia (EGLI) 世界エスペランチスト囲碁協会
UEA-konto: egli-f

Retejo: <http://jega.shisyuu.com/jega/index.html>

Adreso: 2-13-3 Ootone, Maebaŝi, Gunma, Japanio, 371-0825, Japanio
Ĉe HORI Jasuo

371-0825 群馬県前橋市大和根町2-13-3 堀泰雄方

retadreso: horizonto@water.sannet.ne.jp 電話:027-253-2524